

Sennaciulo

Oficiala organo de sennacieca asocio tutmonda

Novembro 2002


73-a jaro, n-ro 11 (1169)

ISSN 1163.0442

Pri la enhavo de artikoloj respondecas la aŭtoroj mem

MENSUEL/MONATA

<http://www.sat-esperanto.org/> *** **retadreso: satesper@noos.fr**



Ĉaŭdefono (CH) nia kongresurbo

aliĝilo en tiu ĉi numero



Du domoj de K.C.E. en nia kongresurbo - Ĉaŭdefono

SAT-ANOJ KUTIMIĜU AL EKSTERNACIA SENT-, PENS-, KAJ AGADKAPABLO! LANTI

El la redaktejo...



Karaj gekamaradoj, tiu ĉi numero de Sennaciulo estas denove varia kiel kutime. Tamen, ĉi-foje vi havas nur 12 paĝojn legendajn. La kvar paĝoj en la mezo estas uzendaj por praktikaj celoj. Tie troviĝas Referendumilo 2002 por la elekto de la nova P.K. kaj la aliĝilo por la 76-a kongreso de SAT en Ĉaŭdefono (CH). Bonvolu do uzi ilin por tiuj celoj.

En la lasta paĝo troviĝas kotiztabelo 2003. Se vi povas, bonvolu pagi vian kotizon tuj kaj tiel vi ne forĝesos. Bedaŭrinde, pluraj el vi ne pagis ankoraŭ sian kotizon 2002, verŝajne pro forĝeso. Jen la okazo por pagi ambaŭ samtempe. Ja, vi ĉiuj scias ke nia asocio vivas kaj aktivas danke al viaj kotizoj kaj via subteno. Sen tio ni ne povus funkcii.

Esperante pri via komprenemo, plej kamaradece salutas vin, via

Redaktoro

Asocia sidejo de S.A.T., administrejo kaj redaktejo: 67, avenue Gambetta, FR-75020 Paris, tel. +33.1.47.97.87.05, telekopiilo: +33.1.47.97.71.90.
Retadreso: satesper@noos.fr.
TTT-paĝoj: <http://www.sat-esperanto.org>
Oficejo malfermita: lunde de 9h30-15h30; de mardo ĝis vendredo: 9h30-16h30. Ekster la laborhoroj funkcias aŭtomata registriilo.
Poŝtkonto: SAT n° 1234-22 K, Paris.
Redaktas: Redakta Komitato - P. Lévy, G. Rollin kaj K. Barkoviĉ.
Ĉefredaktoro : Kreŝimir Barkoviĉ
Ekspedejo de Sennaciulo: adreso de la redaktejo.
Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendas. La limdato de ricevo de manuskriptoj estas la 10-a de kuranta monato.

*

Imprimé par : S.I.B., B.P. 343, FR-62205 Boulogne-sur-Mer Cedex, Francio.
Aperas monate - Mensuel.
Le directeur de la Publication: Jacques BANNIER
Abonnement annuel/jara abono France 52€
Autres pays/aliaj landoj : peti la tarifon de nia peranto aŭ de la SAT-Centro.
Dépot légal à la date de parution.
Commission Paritaire n° AS-74399
Limdato por ricevo de kontribuajoj estas ĉiam la 10-a en la monato.

SENNACIECA REVUO

nova redaktoro

Nia kamarado, Mikaelo SCHERM, la ĝisnuna redaktoro de Sennacieca Revuo, pro tro da laboro en la lernejo kaj manko de tempo, ne sukcesis pretigi la Sennaciecan Revuon 2002. Fine li sentis sin devigata rezigni pri tiu posteno. Ni dankas al li pro laboro farita. La postenon transprenis k-do Jakvo SCHRAM, kiu faros ĉion eblan por aperigi ĝin relative rapide (verŝajne komence de la jaro 2003). Li ricevis de k-do Scherm la ekzistantan materialon por tiu ĉi numero. Ekde nun ĉiuj aŭtoroj bonvolu sendi siajn tekstojn (kun ilustroj) al jena adreso :

Jacques SCHRAM
Hof Ter Bekestraat 49
BE-2018 ANTWERPEN
Belgio

rete: pagadoro@skynet.be

ADRESARO 2003-2004

Ni estas preparantaj la novan SAT-Adresaron. Ni petas vin ĉiujn kiuj en la lasta adresaro trovis eraro(j)n aŭ transloĝiĝis, sendi al ni ĉiujn necesajn indikojn.

Same ni petas ĉiujn LEA-ojn, frakciojn kaj la amikajn asociojn pri kiuj troviĝas informoj en nia adresaro, sendi al ni ĉiujn eventualajn ŝanĝojn kaj korektendaĵojn.

La lasta dato estas 15-a de decembro 2002. Post tiu dato praktike nenia ŝanĝo povos eniri la novan adresaron.

Dankon pro via kunlaboro.

Adresarprizorgantoj



Nova PIV aperis !

Akiru ĝin ĉe SAT.

Prezo: 70 € + afranko

Por Francio : 4,27 €, Eŭropo 6,95 €

ekster Eŭropo : 10,06 €

ATENTIGO AL NIAJ KUNLABORANTOJ

Ni petas ĉiujn niajn kunlaborantojn sendi al ni siajn tekstojn ĉu per la reto en la formato de teksto aŭ sur la disketoj en la formatoj de Word, Apple (Clar)Works, aŭ prefere en la formato RTF. Bonvolu nepre tajpi viajn tekstojn per la sistemo x (cx = ĉ, sx = ŝ ktp) ĉar tio ebligas al ni facile transformi la tekston en normalan Esperanton. Se vi sendas tekstojn surpapere, vi tajpu ilin normale. Dankon.

La Redakcio

Eŭropa Konvencio kontraŭ sociala Eŭropo

El freŝdataj enketoj montriĝas, ke la eŭropa loĝantaro volas havi solvon por la problemo de senlaboreco kaj mizero. Ĉi tio estas la postulo al la Eŭropa Unio. Do oni memevidente atendus, ke la Eŭropa Konvencio al ĉi tiu donos prioritaton. La Eŭropa Konvencio estas la asembleo, kiu preparas la Eŭropan Konstitucion.

Valerie Giscard d'Estaing, iama prezidento de Francio, kiu nun prezidas la Konvencion, forprenas de ni la iluzion. Laŭ li, neniu demandis al la Konvencio pri sociala Eŭropo! Per tio li celas diri, ke neniu, koncerne la socialajn aferojn, petis novajn kompetentecojn por la Eŭropa Unio. Ĉiuj akceptas, ke estonte sociala politiko restos kompetenteco de la naciaj ŝtatoj, kiuj kunordigas siajn socialajn politikojn (la «malferma metodo de kunordigado», precipe laŭmoda post la pintkonferenco de Lisbono).

Socialdemokratio

Malmultaj homoj maldormas pro la deklaroj de Giscard. Ili pensas: Eŭropa Unio faras striktan novliberalan politikon, do eble ne valoras, ke la Unio ricevu tro da socialaj kompetentecoj. Ĉu ĉi tiuj homoj malpravas?

La socialdemokratio, forte reprezentata en la Konvencio, jam dum jaroj faris el la «sociala Eŭropo» disputtemon. Oni rakontis, ke la eŭropa evoluo iras en bona direkto. Ni jam havas merkaton, monunuon kaj Eŭropan Centran Bankon. Ni ne endanĝerigu tion. Ni do, devas fini la laboron, per aldonado de sociala elemento al ĉi tiu Eŭropo, por ke ebligu pli bona ekvilibro inter la merkato kaj la socialaj aferoj.

Giscard malvualis nun, ke neniu iam petis pri sociala Eŭropo al la Konvencio. La socialdemokratio eble esperis, ke neniu rimarkis tion, ĉar jes, eĉ neniu hundo havas intere-

son pri diskuto pri nia estonta Eŭropa Konstitucio. Sed oni kalkulis sen Giscard

La social-demokratio jam havas pretan sian respondon: entute ne gravas, ke sociala politiko restos en la manoj de naciaj ŝtatoj, kondiĉe, ke oni praktikos la eŭropan politikon tiel, ke al la naciaj ŝtatoj restos spaco por fari socialan politikon. Devas ekzisti social-demokrata registaro, kiu estu kontraŭpezo al la Eŭropa Centra Banko, kaj kelkaj pliaj tiaj aferoj.

Kiel pli supre jam dirite: fronte al la fakto, ke ĉiuj politikaj formacioj staras malantaŭ la novliberalo, ne estas granda diferenco, kiel la kompetentecoj estas disdonataj. Sed por la socialdemokratio, kiu jam de jaroj postulas de la EU «socialan elementon», tio estas unuaklasa kapitulaco.

Imagu

Kio okazas nun, estas signifoplena.

Imagu, ke ekzemple en Belgio oni proponos lasi la socialan sekurecon al la federaciaj unuoj, dum samtempe la federacia Belgio prizorgos nur la fiskan kaj budĝetan politikon. Komprenu, ke la sociala sekureco, pli ol nun estos subigita sub la federacia politiko de ŝparado kaj konkurenckapablo.

Ankaŭ en Eŭropo tio jam nun okazas. La Eŭropa Unio organizas la fiskan dumpingon kaj submetas la naciajn buĝetojn al striktaj normoj (Maastricht-normoj). Tiel oni fiksas la marĝenojn de la sociala politiko, kiun la ŝtatoj-membroj povas permesi al si. Kelkaj naciaj ŝtatoj eble plu havos marĝenojn, sed devos kalkuli pri la sociala dumpingo en la najbaraj landoj.

Laboristaj movadoj el la membroŝtatoj povas premi, sed restigante la socialan politikon sur la nacia nivelo oni evitas premon al la Eŭropa Unio kiel tia.

Ĉi tiu lasta povas iam iĝi la plej signifiga celo. Oni scias, ke la eŭropa loĝantaro deziras, ke la Eŭropa Unio, antaŭ ĉio, faru ion kontraŭ senlaboreco kaj malriĉeco.

Kiam la Eŭropa Unio ricevos tiurilate la kompetentecojn, eble la eŭropa loĝantaro ekhavigos inklinon por pli interesiĝi pri la agadoj de la Eŭropa Unio, kaj tio certe estas la lasta deziro de la potenco.

Bazaj rajtoj

Ankaŭ sur alia tereno la novaĵoj estas malbonaj. Ĉiuj scias, ke en la Eŭropa Ĉarto de la Bazaj Rajtoj, kiu estis subskribita kaj akceptita ĉe la Eŭropa Pintkonferenco en Nico, kaj kiu iĝos la bazo por la estonta Eŭropa Konstitucio, oni ne parolas pri rajto je laboro, pri socialaj kaso (do ankaŭ ne pri sociala pago), rajto je loĝejo ktp, ktp. Pro tio la Europa Ligo de Sindikatoj decidis, ke ĉi tiu ĉarto ne povas eniri la konstitucion, krom se ĝi estos plibonigita.

La social-demokratoj decidis, ke pri ĉi tiu Ĉarto oni prefere ne plu diskutu en la Konvencio. La kialo: ili timas, ke ĉi tiu Ĉarto estos eĉ pli malfortigita dum estontaj diskutoj. Ĉu ili kuraĝas?

Frank Slegers / tradukis kaj korektis anoj de Progresema Esperanto Forumo

KLOPODOJ DE HISPANAJ SAT-ANOJ

Post kunvenoj okazintaj dum la pasinta SAT Kongreso en Alikanto (Hispanio) kelkaj el la ĉeestintoj kaj aliaj SATanoj aŭ membroj de la hispana LEAO, HALE, freneze kontaktas unu la alian per reto klopodante plivigli la agadon por tio, ke SAT fakte varbu por Esperanto ene de laboristaj kaj organizaj medioj kaj por SAT ene de esperantistaj medioj, kiuj bedaŭrinde ne estas tiom viglaj en Hispanio. Unuaj atingoj jam estas kaj eble baldaŭ aliaj venos. Almenaŭ homoj ne ripozas post someraj kongresoj. Oni planas ian renkontiĝon, kio lastatempe ne okazis, kaj aliajn aferojn.

Jozefo Saliko